

Popola Fronto

INFORMA BULTENO INTERNACIA PRI

HISPANA LUKTO KONTRAŬ LA FAŜISMO

ELDONO DE GRUPO LABORISTA ESPERANTISTA

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: STRATO MAR, NUM. 25

VALENCIA (Hispanio)

VIKTIMOJ DE PROPRA DOKTRINO

Du voĉoj de alta prestiĝo—tiu de la Prezidanto de la Respubliko k tiu de la Ministro por Nacia Defendo—ĵus sonoris, kun profunda akcento, en la unua datreveno de nia tragedio. Per ili ambaŭ, parolis nia brava Hispanio, plena nun de intimaj angoroj, vundita de kruelaj ofendoj, sed ĉiam stoike firma, en sia morala devo, antaŭ la rigida Destino. «Ni estos nenies sklavoj!», diris per klara tembro Indalecio Prieto. «Ni posedas kvincent mil bajonetojn, kiuj scias perfekte sian rolon!» diris rekte, al la publika opinio, Emanuelo Azaña. Ondojn de freŝa fervoro, plaŭde ŝvingas la vero de tiuj arogaj deklaroj al la transa flanko de niaj landlimoj. En larĝaj sektoroj de tiu fronto urĝas argumentaj municioj por ne perdi poziciojn! Tra la revema cerbo de klasikaj idealistoj k simplaj pacifistoj, kiuj oftigas la vortojn je paco kvazaŭ per tio ili evitus la faktojn pri milito, kia konfuzo baraktas, kia erara kompreno ankoraŭ regas, kiam temas pri nia epopeo...

Ni mem, eĉ nun, respektas la noblajn celadojn al absoluta harmonio; tamen, respekto ne signifas rezignon pri amika kritiko, kiam kraketanta fajrero, ĉe kolizio de la realo kun la fantazio, estas bona ŝanco por instigi defendi fizike la spiritan vivon de songoj k revoj. Nia voĉo estas voko, al la honestaj malamikoj de ĉia milito, por eviti ke ilia tre laŭdinda naŭzo al uzo de armiloj estus senkonscia—decidal—servo al la perversaj pastroj de sanga militismo, sciante lerte uzi mildajn sentojn, por siaj detruaj taktikoj.

La rajto, supera garantio por vera pacifismo, valoras nun nenion, eĉ en la emfazaj tribunaloj de la Juro Internacia. Estas necese—dolore, terure k nepre necese—por la hispana Respubliko, idealista reĝimo solene gravurinta, en sia fundamenta kodo, forlason de ĉia milita metodo, gajni pompe k draste kelkajn grandajn batalojn por akiri, nure ja per tio, prestiĝon je ebla venkonto... kvankam la batalojn ni estus gajnintaj dank' al ĉiuj abomenaj rimedoj, kiujn la barbareco ofertas al kanajloj k friponoj, morala kategorio al kiu ni ne ŝatas aliĝi, malgraŭ tentanta konvinko ke nur tiu kondiĉo pezas en Londono. La sperto donas pruvojn: sovaĝa detruado de Baskio, amasaj masakroj en Malago, monstra bombardado de Almerio; tiuj ĉi elstaraj punktoj de tragika listo estis brilaj poentoj, favoraj por la faŝismo, en la velura intrigo de la kancelarioj. Intertempe, nia pravo estis rikano; nia leĝo, ĉifono; nia konvulsianta spasma, teknika analizo...

Tial do se nia rajto, simbolo nun de ĉies rajto, iam atingas agnoskon, tio certe ne okazos pro sentemo de juristoj sed nur—nur!—pro la ĉarma varmo de la publika tutmonda konscienco, kiel spirita apogo al senhezita apliko de forto, granda forto, impona forto, furioza forto de nia Popola Armeo, kun ŝirantaj argumentoj de tankoj, kanonoj, fusiloj, obusoj k aviadiloj... kiujn ni, fervoraj pacifistoj, viktimoj de nia propra doktrino, devas konsideri k akcepti, kun doloro aŭ jam sen tio, kiel utilajn instrumentojn por masoni la fundamentojn de nova socio sen danĝero de milito. Jen praktika pacifismo! Por garde protekti la rozojn, oni fortranĉas la lolon!

Ni batalas, ni militas por la paco! Jen stranga paradokso, kiun ĉiuj devas studi medite k tuj agi konsekvence ĉar neniu hodiaŭ, en la tera planedo, povas kredi sin situe ekster la fermita kurbo de la grandioza demando, kiun reflektas sur la mondo la sopirata rezultato de nia ofero kies resumo petolas tra la digna frazo de Indalecio Prieto k la aplomba aserto de Emanuelo Azaña.

VIZITO AL EKSTERO

POPOLA FRONTO ne estas papera fikcio; ĝin prilaboras k dorlotas laboristaj homoj, kiuj intense perceptas la alternajn fluojn de la hispana tragedio, laŭ eksterlanda takto de la socia pulsado.

Kun pasporto en la poŝo, ni pretigas jam lastajn arangojn de ĉi tiu numero. Almenaŭ unu fojon, ni akompanas kelkajn ekzemplojn en ilia akurata marŝo al la hejmoj, trankvilaj k modestiaj, de amikoj amatoj tra la pura interkonsento de samsortanoj, kiuj deĵoras en malsama posteno de redaktoroj k legantoj. Reĝa reprezento de la hispana popolfrota esperantistaro, en la viglaj debatoj k specialaj kunvenoj de du proletaj Esperanto-Kongresoj, estos utila por forstrekigi dubojn k firmigi konvinkojn antaŭ atentinda amaso de nia movado, profilante tiun okazon mem, por ŝiri anonimecon etendante al vi fratajn manojn k montrante al vi laceajn k plaĉajn, sanitempe, vizaĝojn...

Neeble estas eviti emociion pro kelklaga baldaŭa forlaso de milita medio. La kamarada akompano de ĝentila kongresano, kiel fervora ambasado de multaj popoloj, estas milda ŝmiron por volonte forgesi la ofendojn de gvidantoj, ĝuante la solidaron de gvidatoj. Kun tia intenco, kun tia iluzio, kun tia ekipaĵo ni ekvojaĝas eksterlandan! Ni volas esprimi dankojn per viva voĉo, ni volas prezenti persone argumentojn kvankam tro konatajn... Ni volas ja ankaŭ senlace persisti je la nepre neceso de unueca bloko kontraŭ la faŝismo, kontraŭ la rutino, kontraŭ la sektismo de burokratoj, de filistoj, de dilettantoj... Ni volas, finfine, vidi vin, alparoli vin, por rememori vin ĉiam!

La komenco de Aŭgusto, tipa sezono de viglaj rendevuoj por la esperantistoj, koincidas nunjare kun la Internacia Semajno de laborista agitado, por praktika helpo al Hispanio. Favora ŝanco, por publika elmontrado de nia vivanteco, hazarde prezentigas por verdigi la hurlojn de amasaj lavangoj, finfine sciante jam nefe, ke la timo, en superaj salonoj, al faŝistaj minacoj, ne ĉesos ĝis kiam aperos paniko al forta opinia movado.

Tial, ne nuloj, ĉio estu ni!! Kamaradoj k amikoj, el kongresaj urboj, ĝis tre baldaŭ!

«Ne kredu, ke mi pensas pri politiko bazita sur armiloj, aŭ ke mi intencas militistigi la landon. Ne! La plej granda virto de la popolaj armeoj konsistas el tio, ke ili vibras k hardiĝas por altaj idealoj, kiujn oni defendas en tranĉeoj. Kiam la idealo venkas, tiam oni forlasis fusilon k tuj reprenas laborilon aŭ libron, revenante ĉu al fabriko, ĉu al laboratorio por esti la pacemaj civitanoj, kiaj oni ĉiam estis. Jen estas la ĉarma virto de ĉiu Popola Armeo!» Fragmento el diskurso de la Prezidanto de la Respubliko.

LA PREZIDANTO AKUZIS!

En la jubilea tago pri la unua datreveno de nia milito, en la Universitato Solenejo, antaŭ ministroj k' aŭtoritatoj, parolis denove la Nacia Prezidanto; kun serena emocio li studis la ĝeneralan situacion k' akuze nudigis la strukturon de la Londona organismo. El tiu parto mem ni prezentas koncizan resumon, pro materia neeblo je ampleksa traduko.

Germanio, Italio k' Portugalio, en cinika kombino, invadas la teritorion de Hispanio. Antaŭ invado pruvita, elmontrita k' ne provokita, kion faris la Respubliko? Hispanio, nature k' simple, sin turnis al la Ligo de Nacioj; ĝi ne iris tien por almozi la solvon de sia interna konflikto, ho ne, tute nel Ni pledis en la Ligo de Nacioj por ke, en tiu palaco de la Juro Internacia, oni sciu ke Hispanio, membra ŝtato de tiu Ligo, estas invadita de tri aliaj ŝtatoj, el kiuj almenaŭ du ankaŭ estas membroj de la sama Ligo.

Tial ni iris al Ĝenevo; ni iris, ni iras k' eble poste ankoraŭ ni iros tien! Ni ne opinias, ke por eniri en la templon de la paco estas necese fari bruon pri milito, ĉar ni ja ne volas kredi, ke la Ligo de Nacioj estas ia komedia scenejo, kie du aŭ tri ĉefaj potencoj devigas la modestajn naciojn ludi rolon de pulĉinejoj. Obstine, ankoraŭ ni krede opinias, ke la ŝtatoj je dua vico—kiuj, cetere, estas la plimulto—havas ion utilan por fari, krom kalkuli pri la horoj, kiuj mankas al ili por suferi la angoran sorton, kiun nun suferas Hispanio. Ni pledis serene antaŭ Ĝeneva tribunalo ĉar nia fido, en tiu aspekto, estas treege fortika.

En la komenco, nia aserto pri la invado ŝajnis blufado de «ruĝuloj». Poste, nia voĉo havis ilustrojn de imponaj pruvoj. Kaj nun, kiam la Ligo de Nacioj jam scias senrefute, ke fremdaj armeoj invadas kontraŭleĝe la teron de nia lando, tiam la sola rimedo, kiu aperas, estas ia hezitema rekono, kun solena tono, de tiu skandalo transdonante la aferon al tiu fama Komitato pri Ne-Interveno, kiu funkcias sub nebuloj de Londono.

Kio estas, por kio taŭgas tiu populara Komitato? Ĉiam, ekde la komenco, mi havis dubojn pri ĝiaj veraj celoj; duboj personaj, kiujn, pro tio mem, mi gardis por mi k' ankoraŭ nun mi ne konsideras oportune plene laŭtigi. Mi provos esplori nur la oficialan flankon: La Londona Komitato certe fondiĝis por savi la pacon, evitante ke la hispana kverelo etendiĝus tra la tuta Eŭropo. Bona maniero por atingi tion, estas nature, ke per solena rigoro k' efika kompromiso, la nacioj partoprenantaj en tiu konvencio neniel liveradu al Hispanio trupojn, armilojn, teknikistojn nek iun ajn alian materialon por ŝveligi la militon.

Fakte, la Komitato kuŝas sur falsa ideo k' funkcias sub granda eraro; jen do la fiaskaj rezultatoj: Falsa ideo ĉar, en la tasko por savi la pacon estas nepre premiso respekti la rajtojn, k' en tiu aspekto, la komitato ne povas anstataŭi la Ligon de Nacioj tial ke, tiu delikata afero ne dependas de ĝia limigita povo. Kaj ĝi funkcias sub granda eraro ĉar, en konflikto kiel tiu nia, oni povas interveni per du manieroj: Ekzistas konkreta interveno fripona, rabema; tiun provokeman mikson, la Ligo de Nacioj devis k' povis kondamni k' malebligii. Ekzistas ankaŭ alia interveno; ĉiu jura pacema interveno per la efikaj instrumentoj k' sanaj metodoj de la Ligo mem. Tiu ĉi interveno ne nur estas leĝa k' permesinda sed eĉ deviga k' necesa trudo, kiun la Ligo nepre devus aplikadi k' tamen ne aplikis. Tial la Komitato pri Ne-Interveno, fondita por eviti la fremdan intervenon de la hispana tragedio, sukcesis eviti nur la intervenon de la Ligo de Nacioj! Jen do granda vero.

Ĉiuj, kiuj atendas de tiu stranga Komitato asertojn k' rezoluciojn, pri konkreta principo, funde eraras. La Londona Komitato, pro sia deveno, konsisto k' funkcio ja ne kuŝas sur bazo de la Juro Internacia aŭ sur alia objektiva fundamento sed nur ĝi kaŝas sur la moviĝema planko de politika sablo. Tiu Komitato estas fikcio el

delegitoj de kelkaj registaroj reciproke sin gardantaj, de kelkaj potencoj reciproke sin timantaj, ĉambro kie Hispanio ne havas voĉon, kie la hispana epopeo ne ricevas studon nek ekzamenon tra la pura lorno de la rajto, de la pravo aŭ de la garantio de formala traktato. La suferado de nia nobla popolo influas tie nur kvazaŭ empiria afero el faktoj k' laŭ maniero kiel ĝiaj sekvoj povas efiki, agrable aŭ malagrable, por la intereso de la kvin grandaj potencoj ludantaj je la terura ŝako, kiun ni ĉiuj spertaj. Jen do la realo!

Bedaŭrinda frukto de la Komitato estis la Kontrolo kies ruza apliko spektakle komencis post elŝipiĝo, en ribelaj havenoj, de abunda militmaterialo, sufiĉa—ŝajne sufiĉa!—por venkobati la popolon k' por triumfi la ribelintoj. Sed, ho miraklo! post pluraj semajnoj oni konstatas kun miro, ke tiu impona moderna materialo ne taŭgas nek sufiĉas por frakasii nin, ke la kontrolo, spite dezirojn, ne kapablas strangoli nin, malgraŭ ies kalkuloj. Tuj post akiro de tiu ĝena konvinko, ekaperas la konataj incidentoj en la Mediteraneo, kiuj abomene ne serĉas aliajn celojn ol renversi jam, pro netaŭgeco, la planojn de la mara kontrolo. Tiu perfida vundo efektiviĝis per la barbara skandalo de la fia bombardado kontraŭ Almerio; atenco ankoraŭ sen puno, krom la morala kondamno de la honesta universala opinio, al ĝiaj aŭtoroj. Sciu jam la tuta mondo, ke ajna eskadro povas fordetrui iun marbordan urbon sen protesto nek puno. Kia amara sperto, en nia korpo, kun tiel danĝeraj postsignoj!...

Alta devizo de la Komitato estas konservi la pacon. Sed por tio estas necese taksii unuavice, laŭ ĝusta valoro, la danĝerojn, kiuj minacas la pacon; la Respubliko ankaŭ volas k' avidas pacon, ne nur por Hispanio sed por tuta Eŭropo, por la tuta mondol stulte estas aserti malsaĝe, ke ni deziras, kun perversaj intencoj, ion alian.

Se oficiale la kancelarioj ne sciigis pri la vero, almenaŭ la publika opinio jam konscias pri la reala situacio; pri la flanko kie kuŝas la rajto, pri la zono kie pekas la delikto. Tiu universala popola konscio estas multo, multo, sed ekzistas freŝa argumento, eĉ pli trafa: La nova Armeo de la Respubliko k' ĝia obstino ĝui la liberon per la venko de Hispanio! En la komenco, la ŝtato perdis subite siajn armilojn k' eĉ pli malbone, estis atakata perfide de ili mem. Kaj el tiu konfuzo, post unu jaro, ĵus aperis mirinde perfekta armeo, kiu jam pruvadis, ke ĝi kapablas batali k' venki. Jen do la hispana miraklo!

Mi aŭdas, sen pasio, parolojn pri planoj, pri politiko, pri diplomatio; tio por mi ne plene gravas... ĉar mi scias, pli emocie, ke ekzistas konkreta duona miliono da hispanoj, kun bajonetoj en la tranĉeoj, firme pretaj ne permesi ke la malamiko pasu plu sur ili.

Hodiaŭ, en ĉi tiu tago, al tiuj soldatoj flugas nia admiro k' nia danko, kun la aserto ke ilia ofero tre estos utila por svingi niajn rajtojn, laŭ sola nun ebla maniero. Ni ne kulpas, se por gajni prestiĝon estas necese gajni batalojn. Oni trudis al ni la kruelan dilemon akiri la rajton per la forto. Ĉu forto do?... nu bone, jen la tutan de Hispanio! Post nia venko, sur tiu kampo de la forto, certe brilos la pura rajto de la Hispana Respubliko; ĝi brilos, tiel intense k' hele, kiel brilas nun, en ĉielo, la suno de Madrido!



La Ekscelenca Moŝto la Prezidanto de la Respubliko Emanuelo Azaña kaj Diaz

LA PREZIDANTO AKUZIS!

En la jubilea tago pri la unua datreveno de nia milito, en la Universitato Solenejo, antaŭ ministroj k' aŭtoritatoj, parolis denove la Nacia Prezidanto; kun serena emocio li studis la ĝeneralan situacion k' akuze nudigis la strukturon de la Londona organismo. El tiu parto mem ni prezentas koncizan resumon, pro materia neeblo je ampleksa traduko.

Germanio, Italio k' Portugalio, en cinika kombino, invadas la teritorion de Hispanio. Antaŭ invado pruvita, elmontrita k' ne provokita, kion faris la Respubliko? Hispanio, nature k' simple, sin turnis al la Ligo de Nacioj; ĝi ne iris tien por almozi la solvon de sia interna konflikto, ho ne, tute nel Ni pledis en la Ligo de Nacioj por ke, en tiu palaco de la Juro Internacia, oni sciu ke Hispanio, membra ŝtato de tiu Ligo, estas invadita de tri aliaj ŝtatoj, el kiuj almenaŭ du ankaŭ estas membroj de la sama Ligo.

Tial ni iris al Ĝenevo; ni iris, ni iras k' eble poste ankoraŭ ni iros tien! Ni ne opinias, ke por eniri en la templon de la paco estas necese fari bruon pri milito, ĉar ni ja ne volas kredi, ke la Ligo de Nacioj estas ia komedia scenejo, kie du aŭ tri ĉefaj potencoj devigas la modestajn naciojn ludi rolon de pulĉinejoj. Obstin, ankoraŭ ni krede opinias, ke la ŝtatoj je dua vico—kiuj, cetere, estas la plimulto—havas ion utilan por fari, krom kalkuli pri la horoj, kiuj mankas al ili por suferi la angoran sorton, kiun nun suferas Hispanio. Ni pledis serene antaŭ Ĝeneva tribunalo ĉar nia fido, en tiu aspekto, estas treege fortika.

En la komenco, nia aserto pri la invado ŝajnis blufado de «ruĝuloj». Poste, nia voĉo havis ilustrojn de imponaj pruvoj. Kaj nun, kiam la Ligo de Nacioj jam scias senrefute, ke fremdaj armeoj invadas kontraŭleĝe la teron de nia lando, tiam la sola rimedo, kiu aperas, estas iu hezitema rekono, kun solena tono, de tiu skandalo transdonante la aferon al tiu fama Komitato pri Ne-Interveno, kiu funkcias sub nebuloj de Londono.

Kio estas, por kio taŭgas tiu populara Komitato? Ĉiam, ekde la komenco, mi havis dubojn pri ĝiaj veraj celoj; duboj personaj, kiujn, pro tio mem, mi gardis por mi k' ankoraŭ nun mi ne konsideras oportune plene laŭtigi. Mi provos esplori nur la oficialan flankon: La Londona Komitato certe fondiĝis por savi la pacon, evitante ke la hispana kverelo etendiĝus tra la tuta Eŭropo. Bona maniero por atingi tion, estas nature, ke per solena rigora k' efika kompromiso, la nacioj partoprenantaj en tiu konvencio neniel liveradu al Hispanio trupojn, armilojn, teknikistojn nek iun ajn alian materialon por ŝveligi la militon.

Fakte, la Komitato kuŝas sur falsa ideo k' funkcias sub granda eraro; jen do la fiaskaj rezultatoj: Falsa ideo ĉar, en la tasko por savi la pacon estas nepre premiso respekti la rajtojn, k' en tiu aspekto, la komitato ne povas anstataŭi la Ligon de Nacioj tial ke, tiu delikata afero ne dependas de ĝia limigita povo. Kaj ĝi funkcias sub granda eraro ĉar, en konflikto kiel tiu nia, oni povas interveni per du manieroj: Ekzistas konkreta interveno fripona, rabema; tiun provokeman mikson, la Ligo de Nacioj devis k' povis kondamni k' malebligi. Ekzistas ankaŭ alia interveno; ĉiu jura pacema interveno per la efikaj instrumentoj k' sanaj metodoj de la Ligo mem. Tiu ĉi interveno ne nur estas leĝa k' permesinda sed eĉ deviga k' necesa trudo, kiun la Ligo nepre devus aplikadi k' tamen ne aplikis. Tial la Komitato pri Ne-Interveno, fondita por eviti la fremdan intervenon de la hispana tragedio, sukcesis eviti nur la intervenon de la Ligo de Nacioj! Jen do granda vero.

Ĉiuj, kiuj atendas de tiu stranga Komitato asertojn k' rezoluciojn, pri konkreta principo, funde eraras. La Londona Komitato, pro sia deveno, konsisto k' funkcio ja ne kuŝas sur bazo de la Juro Internacia aŭ sur alia objektiva fundamento sed nur ĝi kaŭras sur la moviĝema planko de politika sablo. Tiu Komitato estas fikcio el

delegitoj de kelkaj registaroj reciproke sin gardantaj, de kelkaj potencoj reciproke sin timantaj, ĉambro kie Hispanio ne havas voĉon, kie la hispana epopeo ne ricevas studon nek ekzamenon tra la pura lorno de la rajto, de la pravo aŭ de la garantio de formala traktato. La suferado de nia nobla popolo influas tie nur kvazaŭ empiria afero el faktoj k' laŭ maniero kiel ĝiaj sekvoj povas efiki, agrable aŭ malagrable, por la interesoj de la kvin grandaj potencoj ludantaj je la terura ŝako, kiun ni ĉiuj spertaj. Jen do la realo!

Bedaŭrinda frukto de la Komitato estis la Kontrolo kies ruza apliko spektakle komencis post elŝipiĝo, en ribelaj havenoj, de abunda militmaterialo, sufiĉa—ŝajne sufiĉa—por venkobati la popolon k' por triumfi la ribelintoj. Sed, ho miraklo! post pluraj semajnoj oni konstatas kun miro, ke tiu impona moderna materialo ne taŭgas nek sufiĉas por frakasi nin, ke la kontrolo, spite dezirojn, ne kapablas strangoli nin, malgraŭ ies kalkuloj. Tuj post akiro de tiu ĝena konvinko, ekaperas la konataj incidentoj en la Mediteraneo, kiuj abomene ne serĉas aliajn celojn ol renversi jam, pro netaŭgeco, la planojn de la mara kontrolo. Tiu perfida vundo efektiviĝis per la barbara skandalo de la fia bombardado kontraŭ Almerio; atenco ankoraŭ sen puno, krom la morala kondamno de la honesta universala opinio, al ĝiaj aŭtoroj. Sciu jam la tuta mondo, ke ajna eskadro povas fordetrui iun marbordan urbon sen protesto nek puno. Kia amara sperto, en nia korpo, kun tiel danĝeraj postsignoj!...

Alta devizo de la Komitato estas konservi la pacon. Sed por tio estas necese taksi unuavice, laŭ ĝusta valoro, la danĝerojn, kiuj minacas la pacon; la Respubliko ankaŭ volas k' avidas pacon, ne nur por Hispanio sed por tuta Eŭropo, por la tuta mondol stulte estas aserti malsaĝe, ke ni deziras, kun perversaj intencoj, ion alian.

Se oficiale la kancelarioj ne sciigis pri la vero, almenaŭ la publika opinio jam konscias pri la reala situacio; pri la flanko kie kuŝas la rajto, pri la zono kie pekas la delikto. Tiu universala popola konscio estas multo, multo, sed ekzistas freŝa argumento, eĉ pli trafa: La nova Armeo de la Respubliko k' ĝia obstino ĝui la liberon per la venko de Hispanio! En la komenco, la ŝtato perdis subite siajn armilojn k', eĉ pli malbone, estis atakata perfide de ili mem. Kaj el tiu konfuzo, post unu jaro, ĵus aperis mirinde perfekta armeo, kiu jam pruvadis, ke ĝi kapablas batali k' venki. Jen do la hispana miraklo!

Mi aŭdas, sen pasio, parolojn pri planoj, pri politiko, pri diplomatio; tio por mi ne plene gravas... ĉar mi scias, pli emocie, ke ekzistas konkreta duona miliono da hispanoj, kun bajonetoj en la tranĉeoj, firme pretaj ne permesi ke la malamiko pasu plu sur ili.

Hodiaŭ, en ĉi tiu tago, al tiuj soldatoj flugas nia admiro k' nia danko, kun la aserto ke ilia ofero tre estos utila por svingi niajn rajtojn, laŭ sola nun ebla maniero. Ni ne kulpas, se por gajni prestiĝon estas necese gajni batalojn. Oni trudis al ni la kruelan dilemon akiri la rajton per la forto. Ĉu forto do?... nu bone, jen la tutan de Hispanio! Post nia venko, sur tiu kampo de la forto, certe brilos la pura rajto de la Hispana Respubliko; ĝi brilos, tiel intense k' hele, kiel brilas nun, en ĉielo, la suno de Madrido!



La Ekscelenca Moŝto la Prezidanto de la Respubliko Emanuelo Azaha kaj Diaz



Francisko - Jozefo Gunter
protagonisto de la aventu-
roj en faŝista teritorio.

Francisko-Jozefo Gunter estas dudekjara ju-
nulo germana. Li estis faŝisto, almenaŭ teorie. Sed
lia idearo disfalis meze de teroro k indigno.

Lia familio estas burĝa, konservativa, katolika
k partiema de Henlein-nazi-organizo de sudetaĵ ger-
manoj, loĝantaj ĉe la nordo de Bohemio, en ĉeĥos-
lovaka teritorio, proksima al la germana limo. En
urbo Teplitz-Schoneau loĝas la patro, direktoro de
ŝtatimpostoj. Francisko estas plej juna filo k li studis
en monaha lernejo. Poste li sekvis kuracistan karieron.
Por fini ĝin, mankis al li du jaroj. Sendependa volo,
forta karaktero, rezultigis ĉe li disigon kun la patro.
Celante arangi mem sian vivon, li ekpensis veni en
Hispanion, fidante al la belaj raportoj de la faŝiste-
maj gazetoj, per kiuj oni reliefigis la kategorion de
la batalo de Franko kontraŭ la «ruĝuloj».

Li aligis k venis! La 25. Majo, ŝirmite de la
nokta mallumo, li saltis el la plej unulinia tranĉeo, k
kuris avidege al la respublikanaj pozicioj, dum faŝista

mitralilo siluetumis lin per kugloj. Kia forta deziro ĝuadi liberon...

—Kial vi venas al ni?—lin demandis niaj oficiroj, kiam li estis ĵus trafinta
la lojalan tranĉeon. La rifuĝanto fikse alrigardis la registaranojn k respondis:

—Ĉar neniu homo sentema povas elporti vivon tie, en tiu sovaĝbestejo»

* * *
Francisko Gunter konatiĝis en sia urbo kun ulo, sin nomanta Bergman,
kiu diris al li: —Mi povas havigi al vi liberigon. Vi havos bonegan salajron k
brilan estonton, k vi kontribuos al triumfo de nobla, justa afero. En la vicjoj de
la «liberiga» armeo de Franko, vi fariĝos fama kuracisto k vi samtempe havos
okazon por pentrado, pri kio vi estas amato.

La 15. Decembro li motociklis al Berlino. En la faŝista ambasadorejo de
Von Franko, oni donas al li leteron por Hamburgo. El la tiea konsulejo li estas
sendata al «Auslands Deutschen Organisation», oficejo en Avenuo Hohe
Bruecke. Tie li aliĝas en la Sanitara Servo de la Naciista Armeo Hispana. Per
germana ŝipo «General San Martin» li startas al Lisbono la 8. Januaro, je la
naŭa k kvarono vespere. Surŝipe li amikiĝis al tri aliaj volontuloj, sin prezen-
tantaj kiel germanoj. Baldaŭ li vidis, ke ili estas hispanoj. Ili konfesis al li, ke
ili estas elvojaĝintaj el Madrido, kiel multaj aliaj faŝistoj, pere de la germana
konsulo, kiu havigis al ĉiuj, dokumentojn k germanajn pasportojn. Ĉirkaŭ
okcent personoj, partoprenintaj aŭ kompromititaj je la ribelo en Madrido,
sukcesis eskapi dank' al tiu helpo.

La 14. tagmeze, la ŝipo alvenis Lisbonon. Neniu dogana ĝeno, ĉar ili
estas germanaj volontuloj. La ambasadoro de Burgos donis al ili veturbileton
ĝis Badajoz (Hispanio). Spite al la kontrolo, samvoje transiras al Hispanio
sennombraj eksterlandanoj por plifortigi la armeon de Franko. Miloj k miloj da
viroj trapaŝas la portugalan limon, kiel faris Gunter, tute senĝene.

La alveno en Badajoz kaŭzis fortan impreson al la germano. Jen liaj

VORTOJ DE GENERALO MIAJA

Generalo Miaja famekonata defendanto de glora Madrido, estas homo de malmul-
taj vortoj. Liaj deklaroj al la ĵurnalistoj ĉiam estas koncizaj. Kiel pruvo pri lia stilo, jen
du proklamoj lastatempe dissenditaj al la soldatoj k al la civila loĝantaro de la ĉefurbo.

«Kamaradoj! Vi elportas jam kvaragan batalon k vi montriĝis tiaj, kiaj vi ĉiam es-
tis. La ofensivo tiom aspirata de ĉiuj, komenciĝis. Aviadatoj, arilerio k infanterio luk-
tas arde, kiel harditaj veteranoj. Je vi esperas la antifaŝista Hispanio la venkon de niaj
armiloj. Antaŭten senŝancele, pensante nenion krom la venko! Laŭrojn por la herooj
falintaj! Via generalo, Miaja.»

«Madridanoj! Komenciĝis por niaj armiloj tago de lukto. Nia Popola Armeo ba-
tatas bravege k venkas. Tagon post tago, pliiĝas ĝia batalema efiko k ĝi konkeras no-
vajn gravajn poziciojn de la malamiko, kiu por venĝi tiujn perdojn, kanonpafadas mal-
kurage la urbon. Tiu bombardado estas plej bona simptomo pri ĝia malvenko sur la
batalkampoj. La ariergardo havas gravan rolon en tiu ofensivo de nia Armeo; en la
laborejoj intensigante la produktadon, k atentante pri la kaŝaj malamikoj, pli dange-
raj ol tiuj, kiuj kontraŭstaras al ni per fusilo ĉe la frontoj. Estu ĉiuj je la alteco de tiuj, kiuj
batalas k morias por la sukceso de nia justa idealo.

Vivu niaj sukcesantaj armiloj! Vivu la Respubliko! — Generalo Miaja»

Antaŭ la mikrofono de Radiostacio Madrido, li mallonge ankaŭ ĵus paroladis tiel:
«Oni faras kontraŭ ni militon, ne havinte arogon deklari ĝin. Oni atakas popolon
sub la vido de la demokratiaj potencoj de la mondo, senkonsciaj pri la fakto, ke la Fa-
ŝismo ne simple atakegas nin, sed ĉiujn demokratiojn. Se ni estas la unuaj viktimoj,
tiu estas ĉar oni renkontis fiulojn, kiuj vendis k perfidis sian patruon, sed se oni ne
estingas la fajron, ĝi atingos ĉiujn demokratiajn landojn de Eŭropo.

Tiu luktego estas milito de la Kapitalismo kontraŭ la Laboristaro. En Hispanio,
la popolamaso, kiu jam de unu jaro batalas por forjeti la intervenistojn el sia teritorio,
luktas ja por ĉies venko. Ni venkos eĉ se kunigas kontraŭ ni ĉiuj faŝistoj de la mondo!

Dejoru ĉiu el ni sur sia posteno. La tago de la triumfo ekaperas sur la horizonto!

AVENTUROJ DE GERMANA VOLONTULO

vortoj: «El Lisbono, mi estis kondukata kun kvardek kvin aliaj iluziemuloj al la zono regata de Franko. Mi supozis, ke la loĝantaro de Badajoz akceptus nin ĝoje k ĝentile, sed ni ne vidis entuziasmon en la urbo, nek por Franko nek por ni. Ni tute ne estis bonvenataj. Male, la loĝantoj rigardis nin kiel trudemulojn».

Post mallonga restado en Badajoz, li iras al Seviljo, kie li deĵoris dek tagojn. Iun matenon, irante al la Komandejo por koni sian destinon, lia sentemo impresiĝas dolore vidante, ĉe la korto mem, oficirojn, kiuj batis per vipo du knabojn pli junajn ol dekkvinjaraj, kiuj rifuzas konfesi, kie sin kaŝas la gepatroj. Pro la batado, la knaboj falas teren, sangumite.

La juna ĉeĥo komencas perdi la fidon, li priskribas tiel sian impreson pri Seviljo: «Ĉi tio estas inkubo. Antaŭ magazeno, aŭtomobilo haltas. Oficiroj de Franko eksaltas, montras dokumenton rajtigantan ilin, sen pluaj zorgoj, kunporti ĉion, kion ili volas. La mastro ne povas paroli pri tio. Kelkaj, kiuj flustris anstataŭ silenti, estis mortigataj. La ekspluatado al la laboristoj estas terure peza. Oni postulas de ili maksimuman laborforon kontraŭ minimuma saĝaro. Multaj laboristoj, oficistoj, mezklasanoj, perdis sian vivon pro kontraŭstaro al tiu ekspluato malhomeca. Baldaŭ mi rimarkis, ke la tuta popolo nur celas, liberigi sin el tiu terursongo. Mi jam vidis, kiel tiuj fihomoj sin ĵetas sur la viktimojn k barbarece batas ilin. Ankoraŭ pli naŭzis min la senmoralaj ekscesoj de la oficiroj de Franko, kiuj pretendas jam akceptigi en Hispanio la pederastion aŭ «la kulturon Rohem»...



Renkontinte norvegan amikon, tiu ĉi diras, ke li estas trompita. —Tio ĉi estas terura! Ili estas murdistoj! Malgraŭ la tempo jam forpasinta de la komenco, ĉiujn tagojn frumatene, la murdoj kontinuas... Hieraŭ, kontraŭ la muroj de la tombejo estis mortigataj pli ol sepdek personoj, inter kiuj dek unu virinoj. Antaŭ kvin tagoj oni mortpafis tuj sesdek du gelaboristojn de municifabriko, ĉar oni diras, ke la tieaj bomboj ne eksplodas... Ĉiunokte okazas same, ĉiumatene sur la ŝoseoj aperas kadavroj kripligitaj. Post la naŭa horo vespere, estas tre danĝere trairi la urbon.»

Inte al Talavero, li estas tute elrevigita. La salajro estas tri pesetoj kun okdek kvin centimoj entute. La nutraĵo ne estas abunda. Oni sendas lin al fronto ĉe la historia rivereto Jarama, en la unua linio kun bataliono de la Legio.

En la batalfrontoj, apud la ĉefurbo de la Respubliko, Gunter postenis tri monatojn k duonon. Lia sentemo estas fordetruiĝinta, lia faŝista idealo estas forgesita. La krueleco ĉirkaŭanta lin estas sufokiga. Dum teruraj bataloj, la bataliono de legianoj perdis centojn da homoj. Ili estas nun en Aravaca. Ĉiuj rakontas teruraĵojn. Preskaŭ ĉiuj, laŭdire, estis varbataj perforte k per allogaj mensogoj. Multaj, kies patroj aŭ familianoj estis antaŭe mortigataj kiel «ruĝuloj», konservis sian vivon kondiĉe ke ili aliĝu la Legion. Ili estas envicigitaj kontraŭvole. Ili estas tre kompatindaj viktimoj!

Turni la kapon dum militago signifas du kuglojn en la nuko. La disciplinon oni aplikas per teroro. La oficiroj drinkas, punas senmotive soldatojn. Du tagojn antaŭ ol sia forkuro, Gunter vidis, ke iu kapitano ordonis fusilmortigon al dek unu deĵorantojn, kiuj rigardante la forkuron de sep legianoj ne pafis.

En la ariergardo, la spektaklo estas senkuraĝiga. Neniu laboras ĉar la laboristaro estas ekstermita. La kamparo estas sensema, pro manko de terlaboristoj. Estas ĝenerala malsato. La popolanoj mizeraj, enviciĝas ĉe la kazerno por disputi inter si la restaĵojn de la malriĉa nutraĵo donita al la soldatoj.

Post kvintaga ripoztempo, Gunter aperas nun ĉe la tranĉeoj, kiuj situas plej antaŭe. La moralo tie estas katastrofa. Per teroraj procedoj oni retenas la homojn. Civilgardistoj, okupantaj nekonatajn observejojn, dediĉas sin al ĉasado de forkurintoj. Ili ricevas po ĉiu, kvindek pesetojn. Rempas laciĝo ĉe la soldataro. Neniu esperas la triumfon de Franko.

La 25. Majo, la juna ĉeĥo, je la dekunua nokte forkuras. Aliaj konas lian planon sed ili ne kuraĝas sekvi lin. —Ne timu, foriru! Mi pafos alten per la mitralilo, por ŝajnigi, ke mi plenumas mian devon...—diris al li malgaje iu el tiuj homĉasistoj. Fine Gunter atingis la lojalan tranĉeon, kriante: — Ne pafu, kamaradoj, mi estas forkuranto!

—Oni atentis min plej zorge, kun estimo. Oni donis al mi tabakon k nutraĵojn. Tio ĉi ne estas tiol Ĉi tie estas homoj, ideoj, kamaradeco. Tie estas sovaĝaj bestoj, miskompreno k mortigaj pensoj. Ne plu restas ĉe mi faŝistaj ideoj. Mi hontas, ke mi ilin havis. Nun mi volas batali por la Respubliko, kie k kiel ajne oni ordonos min. En ĉi tiu kampo, la lukto signifas savon por la kulturo, por la civilizo, k por la libero de ĉiuj popoloj de la mondo.

Dirinte tiujn vortojn, Francisko-Jozefo Gunter promenas tra la stratoj de Valencio en gaja kamaradeco kun aliaj homoj, ankaŭ fuĝintaj el la faŝista infero.

ALVOKO DE LA ARMEA MINISTRO

Indalecio Prieto, socialista ministro de Nacia Defendo, okaze de la unua datreveno de nia milito, adresis, al la tri branĉoj de la Popola Armeo, varman alvokon el kiu ni publikigas belan fragmenton:

«La despotismo, ĉiam abomena, estas milfoje pli naŭza kiam ĝi torturas per fremda imperialismo. Tre ŝokas tio kun la tradicia spirito de Hispanio, sobra lulilo de nacioj, kiam la frenezo de kelkaj hispanoj naskis la ŝancon por aĉa tia honto.

Sed vi gardostaras, lojalaj soldatoj de tero, maro k aero por eviti tion. Vi enviciĝis por ŝtopi la vojon al hispana tiranio. Vi deĵoras nun por renversi la fieron de ĉia fremda tiranio!

La milito estas akra; ĉiu milito estas kruele! Rezisti, nur rezisti, sufiĉas por venki. Tamen ni devas alproksimigi la triumfon por haltigi la fluon de sango k mono. Ni devas frue rapidigi la pacon frue kaptante la venkon. La ŝarĝo, kiun la Historio metis sur la ŝultroj de la nuna generacio el hispanoj estas ega. Ni luktas solaj, kontraŭ la potenco de la universala despotismo, inter la ŝtata indiferento de aliaj nacioj, sed, kio gravas? Ju pli riska la entrepreno, des pli glora la sukceso!

Soldatoj, fidelaj soldatoj de tero, maro k aero: Al vi, nur al vi, apartenas tiu gloro. Konkeru ĝin! Vi ne luktas por la brilo de dinastio nek por la privilegioj de supera feŭda kasto. Vi luktas por la digno k libero. Starigu tion! Ebligu do ke Hispanio estu nesto por tiuj homaj kvalitoj, povante, post firma enradikigo, disdoni la maturajn fruktojn al la tuta mondo; same kiel, antaŭ jarcentoj, ĝi malfermis vojojn por la civilizo, defendante, antaŭ propraj reĝoj, la rajtojn de popolanoj. Soldatoj de la Respubliko! la Homaro vin rigardas, la Historio vin atendas, antaŭen, antaŭen ĉiam!»

OFENSIVO DE NOVA ARMEO

Diri, ke ni venkos ĉar ni pravas, estus nur romantika argumento. De komence, fidante ĉion al la improviza impeto de la popolo, tio riskis pereigi la plej bonajn klopodojn de la amasoj.

Ĝis kiam la vorto «organizado» ne estis ripetita multfoje, la popolo ne sukcesis havigi al si taŭgan armilaron. Nun jes, nun la popolo posedas armeon, kapablan armeon, potencan k aŭdace armeon!

Kun tiuj soldatoj, harditaj, forĝitaj en la fajro de la milito, oni povas trakuri kilometrojn k transsalti la vilaĝojn, kiujn okupas la faŝistoj. Instaligis la malamarkon en tiuj vilaĝoj. Ili kredis, ne plu esti devigataj forlasi ilin. En la plej bonaj domoj, ili starigis la oficejojn de «Falange Española» (*). El la stoploj eligis la «kacikoj» (**) kaŭrante, por iĝi ree vilaĝestroj. La bretaroj de la vinvendejoj ŝtopigis per boteloj de brando kun etiketoj, kies teksto estis: «Vivu la ĉefgeneraloj!».

Oni ne timis ĝenojn tra tiu flanko de la fronto. Nek ili supozis, ke povus subite alveni armeo tia, kia ĝi prezentigis antaŭ iliaj tranĉeoj iun matenon, bruliganta de suno. La faŝistoj dronis en siaj tranĉeoj. Ili atendis, pleje, kelkajn disigitajn batalionojn. Sed, neatendite, ili konatigis kun tiu vorto: «kapableco!»

Alvenis du eskadretoj de aviadiloj kun la flugiloj ruĝkoloraj. Je sescent metroj, ili bombardadis la poziciojn. La bomboj falis en la tranĉeojn k en la remparojn brikaritajn. La ĉasaeroplanoj malsupreniĝis rapidege k mitralis la pikildratarojn. Je tri mil metroj, flugadis intertempe la italaj «Fiat», rifuzante la batalon. Tuj komencas nia artilerio. Niaj soldatoj ne malŝparas obusojn. De la montetoj ni vidis trafi la celon, situanta en kvaŝaŭ nigra funelo. Ekvesperigante, la kanonoj daŭrigis sian senlacen pafadon, disfalgante murojn, kun afiŝoj «falangistaj» pri jugo k sagoj.

* * *

Oni memoras tiun vojkruciĝon de Pinto, ĉe la ŝoseo de Toledo, kie oni vidis ekaperi, en Oktobro, la unuaj tankoj de la solidareco. Estis tre malmultaj. Niaj soldatoj—kun la angoro


(*) «Hispana Falango» — Specife faŝista movado, politika kerno de la militlibeo.

(**) «Cacique» — Politikaestro, kiu duonfende regis ankoraŭ, antaŭ la milito, sur la hispanaj vilaĝoj.

de la retiriĝo k la laciĝo de centoj da kilometroj—akceptis ilin kun ĝojo k espero, k ekmarŝis post la maŝinoj, revante pri neebila rekonkero.

Nuntage la Popola Armeo portas antaŭ si, en sia liberiga vojo, longajn vicojn da tankoj, kiuj forigas ĉiun baron. La tankoj de la popolo estas armilo bone uzata. La hispanaj junuloj, kiuj gvidas ilin, posedas ĝustan sencon pri la vivo. Ili scias, ke ĝi valoras multe por lukti. Tre malmulte en la horo de la morto.

Oni rigardas, kiel la tankoj grimpadis la montetojn, en atako al vilaĝo Quijorna. Kelkaj falegis sur sia dorso, vundite de la kanonoj de la faŝistaj pozicioj. La aliaj kontinuas k pistis la tranĉeojn de la civilgardistoj. La vicoj de tankoj ĉirkaŭis la vilaĝon.



Almenaŭ per emblemoj, la hispana faŝismo trompas nenion! Jugo k sagoj, kiel klara blazono, malindigas muron de grava vilaĝo, ĵus rekonkerita en la fronto de Madrido.

Fera cirklo ĉirkaŭ la fortikaĵoj de la faŝismo! Kaj ili sufokis la reziston de la intervenistoj. Fine, ili saltis for el la tranĉeoj k kuris, kuregis supren al la monto, aŭdante la mortigan avizon de niaj tre laboremaj mitraliloj.

* * *

Ĉiu revolucio kreis grandan armeon. Armeo malsama de ĉiuj aliaj. La Francio de 1793. k la Rusio de 1918. scias multon pri tio. La revoluciaj armeoj havas multajn mankojn, ĝis ili alvenas al organiza punkto. Ili estas impetaj armeoj, sed ŝancelaj. Armeoj rapidaj, sed rapideco povas flui plurdirekten. Poste, ili fariĝas grandaj armeoj. Kiam tio okazas, la fino de la revolucio, de la revolucia milito—en nia kazo, civilmilito, ne provokita de ni, aliĝinta poste je invadmilito — proksimiĝas. Tio eble okazos en Hispanio. Tiuj korpusoj estas pretaj. Ĉiuj iliaj armi-

loj akordigas, k ĉiuj iliaj homoj scias ĉiam, kion ili devas fari en ĉiu momento de la batalo. Ĉiuj posedas politikan spiriton, klaran k konkretan. Tiu estis unu el la premisoj, kiuj ne ŝajnis tia al ĉiuj, kiuj ne povis kompreni, ke nia Armeo bezonis esti politika armeo.

Pro sia spirito—forta spirito, kiu kaptas la ĵus alvenintajn rekrutojn—tiuj homoj sin ĵetas blinde kontraŭ la malamiko en la fronto k trapasas, sentime antaŭ la terura pafado, super la abismo de brulanta tranĉeo.

Ili estas soldatoj, kiuj grimpas monteton, enmeze de la kruciĝantaj obusoj de la itala artilerio, kun la fiero de kanto proleta en la buŝo: la grandioza kanto de «La Internacio».

KONTRAŬJUDA PROPAGANDO

La faŝismo etendas siajn intrigojn al la franca zono de Maroko. Specialaj agentoj ekspluatas la tradician malamikon de la mahometanoj al la judoj. Oni enkondukis en tiun regionon, verkon en araba lingvo, kies titolo estas «La juda danĝero», traduko de francalingva eldono.

En la kovraĵo estas jenaj vortoj: «Tiu libro enhavas la informojn de la publikaj k sekretaj kongresoj de la judoj k ilian gvidlinion por disvastigi sian influon sur la Terglobo. Ĝi publikigas nun en araba lingvo, por ke la mahometanoj konu la judan danĝeron k povu sin gardi kontraŭ ĝi. La verko konigas la celon k intencojn de la malamikoj de la mondo.»

La verko entenas antaŭparolon, «Vortoj de junulo», per kiu oni incitas la mahometanojn kontraŭ la judojn k la framasonojn. En ĝi estas dirite: «La civilmilito hispana estas frukto de la Framasonaro k de la Judaismo; baldaŭ ĝi ne povos esti detenita en la limoj de Eŭropo, ĝi etendiĝos tra Norda Afriko k eksplodos fajro de nova milito tutmonda.»

Ĉar la verko estas malpermesita en la franca Protektorato de Afriko, la Juda Ligo de Rabat petis de la Registaro, ke la ekzempleroj trafintaj la marokan teritorion, estu forprenataj.

La Faŝismo ja ne perdas tempon. Ĝi estas agema! Zorgu ĉiuj pri ĝi!

NEDERLANDANOJ!

La daŭra k trafa apero de la nederlandlingva reeldono de POPOLA FRONTO devas esti, por vi ĉiuj, honora fiero kolektiva. La kuraĝaj iniciatintoj, kiuj tiel sukcese aperigis jam du numerojn deziras fervore dividi kun vi la labordojn k zorgojn de tiu utila laboro. Helpu ilin tuj senhezite! Skribu hodiaŭ mem al jena adreso:

K-do H. J. NIEUWENHUIZEN
Laakhof, 37. — HAGO (Nederlandoj)



La digna katolika Prezidanto de Baskio Antonio Aguirre

TRAGEDIO DE RABISTOJ

MAŜINARO SENUTILA

La baskoj, en mirindega kontrasto al barbaraj faŝistaj metodoj, detruis morale la efikon de la rasenda maŝinaro nur per volonta foriro de la homaj brakoj.

Kiam la germanaj aviadistoj detruis la baskan regionon k' ekstermis senkompate la enloĝantojn, Franko sin turnis cinike al la mondo k' diris, ke Durango k' Gernika estas fordetruiĝintaj de la «ruĝuloj».

Neniu kredis tiun kalumnian mensogon de la ĉefgeneralao. Des pli granda estas tiu falsaĵo, post legado de la manifesto, kiun Prezidanto Aguirre dissendis al la tuta mondo. En ĝi, la Baska Registaro proklamis, ke forlasinte la ĉefurbon, ĉio restis en ordo, sendefekte funkciebla. La baskoj povus esti ruinigintaj en cindron la fabrikojn, la maŝinojn, ĉiujn ilojn de laboro de sia riĉa zono, anstataŭ liveri ilin en bona stato al la okupantoj, kiuj uzus ĉion tuj kontraŭ la evakuintoj. Sed la baskoj amas profundege sian naskiĝlandon k' ili ne volis fari al ĝi malbonon, laŭ kruda, sed natura leĝo de milito.

Tie restis do, pretaj por funkciado serve al la novaj mastroj, la kolosaj fabrikoj, kuŝantaj ĉirkaŭ Bilbao, apud la rivero, kun la neeviteblaj damaĝoj okazigitaj de la faŝistaj artilerio k' aeroplanoj. Krom tio, la laborejoj restis en bonaj kondiĉoj por tuja produktado. Kun doloro, la laboristoj forlasis ĉion, sed ili ne kuraĝis detrui ĝin. Tio ŝajnus al ili, ke ilia koro estas samtempe detruata... Karese ili adiaŭis la laborlokojn ĉe sia necesa foriro.

La tragedio de la rabistoj estas instrua k' plensignifa. La novaj faŝistaj mastroj ne trovas brakojn por la fabrikoj. Ankaŭ ne por la tiom sopiritaj minejoj. Nek per petoj nek per minacoj, ili sukcesas varbi laboristojn! Soleco

regas ĉirkaŭ la senfruktaj riĉaĵoj. La gigantaj kamentuboj staras senfumaj. En la ĉiam eterne bruanta zono, pezas plumbe nun densa silentego. Mankas brakoj por pagi la fakturojn de Hitler k' de Mussolini. Mankas brakoj por produkti militmaterialon por Franko k' liaj aliancanoj. Urgas solvi la problemon! Ili supozis, ke la konkero de Bilbao donus al ili senliman riĉecon k' eblojn senlimajn. Sed ne restas laboristoj en Bilbao. Se restas kelkaj, ili sin kaŝas, ne atentis la alvokon k' serĉas la manieron, profiti la noktan mallumon por kuri for, al siaj klasfratoj.

La «naciistoj» k' la invadistoj ja povas fari perfortan varbadon en la cetera parto de Hispanio sur kiu ili regas aŭ importi sklavecajn homojn el ie ajn. Sed ili rapidu, ili gajnu tempon, ĉar la cirkonstancoj estas al ili, de tago al tago, pli malfavoraj. Kaj fine, ili bedaŭros, ke ili ne eltiris al si ĉiujn promesitajn rezultojn el la konkero, kiu laŭ deklaro de Franko mem, kostis al ili dudek-du mil homojn. Konkero, kiu—ili esperis—estus la ŝlosilo de la milito. Sed la milito komencas nun, niaflanke, post longa unujara streĉa rezisto de la popolo preskaŭ sen armeo, ĝis nun...


SENPAGA REKLAMO

Ordinara k' ĝentila kutimo, inter kolegoj, estas la interŝanĝo de iliaj respektivaj eldo-

naĵoj. Fidela al tiu elementa normo POPOLA FRONTO vizitas akurate ĉiunumere la redak-tejojn de ĉiuj Esperanto-gazetoj el kiuj, preskaŭ ĉiuj komplimentas nin per sama reciprokeco. Tamen, unu el la esceptaj kazoj, de sistema mal-atento al nia gazeta ekzisto, estas la konata periodaĵo el Budapeŝto «Literatura Mondo» kiu, tra bonanima kampo de nia verda movado, pe-dante k' memlaŭde, fosas nur sian propran sulkon

Ni ne almozas amikecojn, kiujn cetero ni ne bezonas. Ni mencias nur kolegan «samideanan» konduton por publika juĝo. Kompare kun ĝia luksa papero k' dika pagaro, nia modesta revueto ne gajnas poentojn. Sed ankaŭ ne; ho, tute nel ĝi perdas la moralan prestiĝon de humana verko, kiu ricevas, por sia materia vivo, la centimojn de kvin miloj da legantoj, k' glutas, sub premo de angoraj cirkonstancoj, horojn de ripozo, rez-ervojn de sano k' eĉ pecojn da vivo de siaj prizorgantoj, sen forgeso, en kruda k' tro seka temo, al stila estetiko, kun atento al arto k' sen ofendo al la bona eduko k' socia deco.

Ĉar la negoco estas la negoco, el tiu ĉi senpaga reklamo por «Literatura Mondo» pro-fite ni faris ankaŭ memlaŭdon, iomete imite al grava tre komerca paro, en lula arĝenta duopo...



La apaĉo prezentas «senkulpigojn» al la juĝistoj.

La fidela Insulo

Unu sola insulo, renversinte antaŭ unu jaro la internan faŝismon, restis fidela al la Respubliko: ĝi estas Menorka, dua laŭ amplekso k' unua laŭ strategia vidpunkto, el la kvin insuloj de la Baleara arkipelago. Mahon, ĝaja ĉefurbo de tiu potenca popola citadelo, en la Mediteraneo, rezistis jam multfoje la atakegojn de la itala faŝismo; sed Mahon, kun obstinaj defendantoj, per taŭgaj kanonoj, faligis multajn nigrajn aviadilojn. La sola respublikana insulo, modelo de sindonemo k' logaleco estas unu mirinda ek-zerplo pri kuraĝa loĝantaro, kiu blokita ĉirkaŭe de malamika maro eltenas gardostare la rajton, liberon k' dignon de la nova Hispanio, kiu rigardas kiel juvelon la solan insulon, kiu nun bata-las kontraŭ la plej modernaj piratoj de la antikva maro latina.

NATURA KONSEKVENCO pro nia terura milito estas la kreskanta plikariĝo de la papero, poŝto, presado k klišoj por la eldonado de POPOLA FRONTO. De la unua numero ĝis nun triobligis la prezoj! Pliaj vortoj superfluas, ĉu ne?...

ĜENERALA INTERNACIA ADRESO
nur por mono

GUSTAVE FARENC
55, Rue Brise-Pain
Poŝtekonto 13944 Orleans
ORLEANS (Loiret) FRANCIO

NEDERLANDA ADRESO
nur por mono de holandoj

PETRO van der PLANK
Van Speijkstraat, 48-1
poŝtgiro 245542
AMSTERDAM W. Nederlando

ANGLIO.—K-do O. MELTON.—25 Fowler Str. Nechells, BIRMINGHAM 7

SVEDIO.—ARBETAR ESPERANTISTEN.—Barnhusgatan 8 ö. g. n. b.,
Poŝtgiro n.º 53411, STOCKHOLM

BELGIO.—K-do M. DELFORGE.—35, Rue de Heigne,
Poŝtgiro 199106, CHARLEROI

REDAKCIA ADRESO POR ĈIO ALIA

POPOLA FRONTO—Mar, 25, Valencia (Hispanio)

Bidonkvanto de ĉi tiu numero:
5200 ekzempleroj

NIA MUNICIO

Valencia esperantistaro...	38'80	ptoj.
G. P. de G.—Barcelona...	5	»
P. S.—Orihuela...	6	»
K. B.—Albacete...	25	»
J. M. B.—Cedrillas...	10	»
L. C.—Cedrillas...	10	»
F. C.—Cartagena...	12	»
A. M.—Benetuser...	5	»
J. R.—Villareal...	10	»
L. V.—Haarlem...	5	gd.
Sekcio FLE.—Aalsmer...	1'60	»
D. v. M.—Amsterdam...	0'20	»
H. W.—Amsterdam...	0'50	»
H. S.—Amsterdam...	4	»
A. L.—Amsterdam...	1	»
A. L.—Sonburg...	0'50	»
FLE-anoj noktipromenantoj...	2'20	»
Sekcio FLE—Sehagen...	2'30	»
Sekcio FLE—Zwolle...	5	»
Sekcio FLE 5—Rotterdam...	2'60	»
G-kdoj. V.—Meppel...	1	»
K-do. L.—Meppel...	0'50	»
J. T.—Skarblacka...	3	sv.kr.
C. F. N.—Tillberga...	2	»
L. A.—Skovde...	5	»
A. M.—Montpellier...	25	ffr.
G. N.—Ostergatan...	1'50	»
J. W.—Morlaix...	20	»
L. A.—Minneapolis...	22'22	»
Groupe Esp. du Travail— Lens...	10	»
Ĉekoslovaks...	15'15	»
Mile. L. L.—Toulouse...	10	»
Klubo Esperantista—Amal...	62'50	»
C. V.—Vaulx en Velin...	10	»
V. S.—Prahá...	7	»
M. D.—Charleroi...	52'31	»
M. L.—St. Quentin...	10	»
K-do. M.—St. Quentin...	10	»
A. A.—Savigny s/ Orge...	5	»
J. B.—Gablonz...	25	»
J. K.—Plzen...	52'09	»
F. P.—Paris...	15	»
K-do. D.—Paris...	10	»
G. N.—Stockholm...	60	»

INTERESA PETO

Ni insiste petegas ĉiujn enlandajn esperantistojn, kiuj deĵoras en la Popola Armeo, ĉu en la batalfrontoj, ĉu en la ariegardo, sendi al ni sian nomon k adreson, por pretigi kompletan liston de esperantistaj armeanoj.

KONSTANTE vi devas diskonigi la enhavon de niaj artikoloj por helpi la lukton kontraŭ la faŝismo.

FERVORE vi devas popularigi ĝenerale nian gazeton, inter viaj amikoj k korespondantoj, por helpi la praktikan aplikon de Esperanto je la servo de la popolaj libero, kulturo k progreso.

KONSCIE vi devas kompreni, ke kiam ni skribas la esprimon «nia» gazeto, tio plene signifas ke ĝi estas kune via k nia.

ENTUZIASME vi devas labori por ke la komuna verko eslu grava gazeto esperantista kun multaj, tre multaj, miloj pli da kontentaj legantoj en la tuta mondo. Tio estas ebla, eĉ facile atingebla! dependas nur de via kunlaboro...

LASTA HORO

Neatendita estis la popola ofensivo en la sektoroj de Madrido. La malamiko perdis gravajn poziciojn el kiuj ĝi, per furiozaj kontraŭatakoj, intencas repreni kelkajn. En ĉiuj ceteraj frontoj la situacio ne montras reliefajn ŝanĝojn. En la aero, la respublikanaj flugiloj plene mastras; la faŝistoj perdis, dum unu semajno, pli ol kvindek aviadilojn; en tiu sama spaco ni perdis nur sep. En la internacia fronto, nia prestiĝo kreskas daŭre en la popolaj tavoloj, dum la sabotado tre persiste agas en la angla Ministerio por eksterlandaj aferoj...

Presejo de J. Olmos, Alicante, 35, Valencia

POPOLFRONTA LETERUJO

V. S.—Srasnice, Praha.—Responde al via p. k. al K-do. Farenc, vi ricevos senpage nian bultenon.

G. N.—Stockholm—Kun estimo ni dankas pro via mensendo k tre speciale pro via interesa, elkora k ĝusta letero. Akceptu sinceran saluton! La gazeteltranĉaĵoj kun iradukoj trafis nin.

J. A.—97 Brigada Mixta - Cartagena—Ni sendos al vi ekde nun POPOLA FRONTO. La abono estas laŭpova, ne deviga k senfiksa tarifo. La elspezoj kreskas!

F. V.—Tarrasa—Ni notas, kun danko, la enhaven de via poŝkarto.

J. M. Tarrasa—Danke ni ricevis leteron kun sciigoj k afablaj vortoj por ni.

K. B.—Albacete—Ni ricevis viajn leterojn. Monon ni kvitancas en la koncerna rubriko. Ni presigas la alvokon, de vi indikita. La numerojn, kiuj mankis al vi, ni jam sendis.

M. M.—Tallin—Ni legis kun dankosento vian ŝatatan poŝkarton. Libervolan mondonacon vi povas sendi al nia Peranto en Francio.

M. E.—Córdoba (Rep. Argentina)—Alvenis via letero kun bankĉeko, kiun ni provos enkasigi. Se ni sukcesus enspezi, ni kvitancos en «Nia Municio». Saluton k dankon!

INFORMEJO

ONI INFORMAS, KE

K-do. Enrique Martín Rubí, kredeble mortis surfronte, batalante kontraŭ la faŝismo. Pluaj detaloj haveblaj ĉe «Laborista Esperanto-Grupo», Str. Milicias Catalanes, 56.—TARRASA (Barcelona).

La ĝusta adreso de nia kunredaktoro, kamarado R. Kiles estas tiu, kiun ni publikigis en nia antaŭa numero, sed sen la vorto GUADALAJARA.

NOVA GAZETO HISPANA

La esperantistaj kamaradoj de la C. N. T. en Barcelono aperigas jam, kun nova k plaĉa presista vesto, sian ŝatatan gazeton «Informa Bulteno» kiu detale k entuziasme defendas, en rilato kun nia lukto antifaŝista, la specifajn vidpunktojn liberecanajn de tiu veterana sindikata organizo. Antaŭen, amikoj!

HOLANDAJ VOLONTULOJ EN HISPANIO A T E N T U !

Nun «Popola Fronto» ankaŭ aperas holandlingve, la prizorgantoj decidis sendi ĝin senpage al ĉiu, en Hispanio, batalanta k-do. Bonvolu sendi k disvastigi tuj ĉi tiun novajon al ĉiuj lokoj, faru peton pri tio al k-do: P. G. v. d. Plank - v. Speijkstraat, 48, I. AMSTERDAM W. (Nederlando)

KORESPONDADO

Simpla trillinia anonceto 4 f. fr.

HISPANIO.—SAT-ano batalanta en la Internacia Brigado petas fotomaterialon por aparato «Kodak 620» t. e. filmrulo de grandeco 9 x 6 1/2 cm. Por ĉiu filmo unu foton interesan de la fronto mi sendos kun mia subskribo. Johano de Strasser, S. R. I. Plaza Altozano num. 71.—ALBACETE.